



Ernest Rutherford, nov-
zelanda Nobelpremiito



Esperanto sub la Suda Kruco

Januaro-Februaro 2005
Numero 73 (Volumo 13, no.1)



ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 73 (volumo 13, numero 1), Januaro-Februaro 2005

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

Telefono: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝte: sudakruco@westnet.com.au

LIBROSERVO

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St, Redfern, NSW 2016, Aŭstralio.

E-poŝte: libroservo@ans.com.au

KORESPONDAJ KURSOJ

Hazel Green, 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio.

E-poŝte: hazgreen@twmmba.net

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso: sudkruco@westnet.com.au; vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mb aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Ne-tajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

SUR LA KOVRILO

Ernest Rutherford (1871-1937), el Nov-Zelando, ricevis Nobel-premion por Kemio, en 1908. Rutherford estis unu el la ĉefpioniroj de esploroj pri la strukturo de la atomo kaj la studo de radioaktivado.

EN ĈI TIU NUMERO

“Pli aŭ malpli” (Gaye Phillips).....	3
Via redaktoro dankas.....	7
Korekto de la datoj de P.L. Travers.....	7
Interrete.....	8
La pac-boato (Penny Vos-Pym).....	10
Pri la vorto “krom” (L. L. Zamenhof).....	11
Osiek-premio.....	12
Nia konkurso “facila”: Respondoj.....	12
Nia konkurso “nefacila”: Premiitoj.....	13
Trevor Steele en Hindio (foto).....	14
Scholarship Program.....	15
Pri la “fidebleco” de lingvoj (J. Petikel).....	16
Recenzo pri la filmo “La tago kiam la mondo haltis” (Tony Petersen).....	18
Mortis Johan Hammond Rosbach.....	19
Sin konigas samideano.....	20
For the Beginner (Donald Broadribb).....	21
Nova poŝtmarko aŭstria.....	25
Vizito de japana amiko (Vera Payne).....	25
Indekso 2004.....	27

Limdato por la marto-aprila numero: 15 februaro.

Pro servilaj problemoj, *ĜK* ne estas aktuale legebla per Interreto.

PLI AŬ MALPLI

VERKITA DE GAYE PHILLIPS

Gvidante la ĉevalon per la kondukrimenoj kaj klinante sian korpon antaŭ la ventego kaj pluvo, Stefano malrapide pelis sin trans la akvosaturitajn kampojn, dum bruegoj tondris en la nigra nokto. “La Dioj koleriĝas,” li murmuris.

Je tagiĝo la ŝtormo malfortiĝis, kaj grizaj nuboj disŝiriĝis en multajn strangajn formojn dum ili kuris trans la ĉielon. Subite, kun unu lasta, laŭta rulado de tondro, kaj konforme al la vetero, rozkolera aŭroro ĵetegis sin sur la horizonton.

Du horojn poste Stefano atingis domon ĉe la periferio de vilaĝo. Ĉar dum la ŝtormo li perdis la vojon, li decidis peti helpon de la domposedanto pri sia celdirekto. Survoje al la dompordo li vidis, kuŝantan sur la grundo apud la ĝardenpado, korpon de juna virino. Ŝi estis tute kovrita de koto, kun la escepto de la vizaĝo kaj hararo.

“Mia Dio!” li flustris. Falante sur unu genuon li tuŝis ŝian vangon. Post mola karesema bateto la virino malfermis la okulojn kaj demandis,

“Kiu vi estas?”

“Ho, vi vivas” Stefano ĝoje respondis. “Mi kredis, ke vi estas mortinta.”

“Ne, ne”, ŝi ridis, “mi nur prenas kotbanon,” kaj ŝi ripetis sian demandon.

“Mi nomiĝas Stefano, kaj mi loĝas en Linta, ĉe la alia flanko de la monto.”

Viro, portanta teleron plenan de salato, alproksimiĝis al la domo. Li haltis ĉe la palisaro kaj alparolis la virinon. Lia parolo estis kurba kaj konvinka.

“Katrina! Vi devas rapidi! La afero urĝas, ĉar S-ino Beto ne ĉeestos pro malsano, kaj Henriko serĉas sian edzinon kiu forkuris kun Petro Bruno; kaj vi ludas en la koto dum via patrino preparis vian lunĉon, ploranta ĉar ŝi ne povis trovi la salon, ankaŭ ĉar ŝi tretis sur la voston de la kato kiu nun kaŝas sin sub la domo. Venu al la kunveno, senprokraste!

Li metis la teleron sur la trotuaron kaj rapide foriris.

Katrina rezignacie suspiris, kaj ekelkotiĝis.

“Stefano, turnu la dorson dum mi survestigas min. Vi rajtas manĝi la salaton, se vi volas.”

Li ja volis, ĉar lia stomako bruetis pro malsato, kaj li havis en sia dorsako nur du malsekajn sandviĉojn. Lin ege ĝojigis ŝia salato sur la strato, do li sidis antaŭ la telero kaj ekmanĝis.

Dum la piediro al la vilaĝo, Stefano klarigis al Katrina la kialon de sia foriro de Linta.

“Mi estis la sola inĝeniero en fabrikejo, kaj kontrolis la maŝinojn kaj komputilojn uzatajn en la fabrikado de pupoj. Unu el miaj asistantoj deziris mian postenon. Li estis la nepo de la estro, kaj fine sukcese persvadis lin maldungi min favore al li mem.

“Kion vi nun faros?”

“Mi restos kun mia onklo, kiu loĝas malgrandan distancon de ĉi tie, dum iom da tempo, poste revenos al Linta por serĉi laboron.”

Post nelonge ili eniris la ĉefstraton de la vilaĝo. El la komunuma halo oni eligis laŭtajn kolerajn voĉojn. “Kio okazas?” kriis Stefano.

“Ho, la lernejkomitato argumentas pri la elspezo de sumo da mono kiun oni heredigis al la loka lernejo. La anoj ne povas interkonsenti pri io, kaj ĉiu ano pretendas, ke la aliaj havas personajn kialojn por siaj sugestoj.”

Ili eniris la halon, kie la aero resonis de interruladaj pretendoj. Katrina adiaŭis al Stefano, kiu promesis viziti ŝin post nelonge. Nesciate de Stefano, Onklo Klaŭdo estis paciento en hospitalo. Du tagojn antaŭe, hejmenirante post la taglaboro, li estis atakita de bando da rabistoj kaj suferis kvar romp-itajn ripojn. Kuŝante sur la lito, lia korpangoro puŝis ĉion alian el lia menso. Sed iompostioe la doloro elspeziĝis ĝis fine, elspezinte lastan doloron, li ĉagreniĝis. Li memoris ke, dum la atako, oni tiregis lian ringon, donaco de kara mortinta Helena, de lia fingro. Ĝi ne multe kostis, sed estis lia plej valora posedaĵo. Kiam li revenis hejme, Klaŭdo pasigis kelkajn plezurigajn tagojn kun Stefano antaŭ lia ekiro al Linta.

Survoje li serĉis provizoran laboron, kun iom da sukceso. Li estis unu el tiuj viroj kiuj rifuzis servi iun kiu penis kateni lin per flato aŭ minaco — oni nomis lin “liberspirito”. Lia granda liberkapablo estis mirinda por la kunlaborantoj, sed ili admiris lian nedependecon.

Unu tagon en stratbazon li vidis grandan lignan statuon de bubo apogita sur fosto. Sur bovlo fiksita al unu etendita mano estis la vortoj:

“Helpu la stratinfanojn.” Mankas al la statuo unu piedfingro kaj duona nazo.

Stefano diris al preterpasanto, “Ĉi tiu bazara bubo bezonis riparon?”

En la fono li aŭdis strangan ripetitan sonon, kiun li trovis enuiga.

“Kio estas tiu bruo?” li demandis al buddungito.

“Ho, tiu devenas de la konkurso en la placo.”

“Konkurso?”

“Jes. Estas premio por la persono kun la plej bele vestita besto.”

Irante en la direkto de la teda bizara bruo, Stefano atingis la placon, kiu estis sceno de konfuzo. Bovoĵ blekis, porkoĵ gruntis, katoĵ miaŭis, kaj ĉevaloĵ timeme henis kaj prancis dum hundoĵ boĵis ĉirkaŭ iliaĵ kruroĵ. Ĉiuĵ bestoĵ estis bele vestitaj, sed la posedanto de la sola azeno gajnis la premion. Ŝajnis al Stefano ke, ĉe la premiprezentado, fiera spiris la bruto de la venkinto.

La sekvan tagon li vidis virinon en kampo, rasantan la surfacon de plugita tero.

“Kion vi faras?” li demandis.

“Mi serĉas karoton meti en la supon.”

“Sed la tero estas nuda, sen ia ajn kreskaĵo.”

“Iam en ĉi tiu kampo karotoĵ kreskis, sed oni rikoltis ilin antaŭ nelonge. Eble restas...jes, jen unu...sed la fosilo distranĉis ĝin en kelkajn pecojn...ne gravas.” Kaj ŝi trankvile rastis karoton por la barĉo.

Li demandis ŝin pri la ebleco de laboro, kaj ŝi mangestis en la direkto de ŝaftondeĵo. Tie li trovis la estron, kiu dungis lin por ripari du difektitajn traktorojn.

La bieno iam estis profitdona, sed pro misadministrado nun estis en malbona financa stato. Ofte laboristo proponis sugeston pri plibonigaĵoj, sed kvankam la estro volonte simulis ajnan bonan iniciaton de la kunlaborantoĵ li sciis ke, pro manko de mono, tiu ne iĝos realeco.

Stefano eniris hotelon por glaso da biero, kaj sidis apud viro kiu diris al li: “La angla lingvo estas malfacila prononci, precipe por alilandanoĵ, ĉu?”

“Mi kredas, ke jes.”

“Dum mia vivo mi penis ŝanĝi tion. Mi kreis novajn simplajn literojn por faciligi la prononcadon, kaj prezentis ilin al la Angla Akademio, sed ili ne akceptis mian proponon. Mi apelis kontraŭ la juĝo, sen sukceso. Ĉu vi volas, ke mi sciigu vin pri tiuj simplaj kaj apelitaj literoj?”

“Dankon, sed ne. Tio ne interesas min.”

“Tio ne interesas iun ajn,” li malĝoje respondis.

En alia parto de la hoteltrinkeĵo grupo de homoj diskutis la ŝtatenverŝon kiu okazis en alia lando.

“La prezidento torturis kaj murdis multajn homojn,” diris unu viro.

“Faru la saman al li.” Sed alia kredis ke la elverŝado de sango de la prezidento ne devas okazi, “alie ni montros la samajn kvalitojn kiel li.”

“Enkarcerigu lin sur insulo kun aliaĵ sovaĝaj bestoj,” opiniis alia.

Rajdante trans la kamparo, Stefano pripensis la aferon; sed pli urĝa koncerno por li estis ke Rosa lame paŝetis. Tial li haltis en vilaĝo por ke iu hufferu la beston. Forĝisto konsentis fari la taskon, kaj dum li laboris li

rakontis al Stefano pri unu el liaj klientoj.

“Tiu viro estis nekonsolebla kiam lia edzino mortis. Irante hejmen post la entombiĝo, li pasis kampon de najbaro, kie porkino ĵus naskis idon. Li rimarkis, “unu morto, unu naskiĝo”, kaj deklaris ke la idino portis la animon de lia edzino. Oni rimarkis ke, en la sekvantaj monatoj, li ofte deliris ŝin vidi, kaj kuris tra la stratoj, ekcitiĝema kaj ploranta. Ĉe Kristnasko la eta porkino malaperis, kaj post nelonge la viro tute resaniĝis.”

Viro preterpasis, kaj la forĝisto ekkriis, “Saluton, Marko! Kien vi iras?”

“Mi iras trans al preter antaŭ kontraŭ apud ekster sub la ponto.”

La forĝisto ridis, kaj Stefano pensis, “Kia stranga respondo!” kaj konkludis ke tiu viro havis la kutimon esprimi sin per longaj, multvortaj, bizaraj prepozicioj.

Dum li manĝis lunĉon en loka kafejo du mezaĝaj virinoj eniris kaj sidis ĉe tablo apud li. Ili portis vestaĵojn kiuj estis iomete eksmodaj, sed havis la mienon de ĝentiluloj. Post kelkaj minutoj viro aliris al ilia tablo kaj alparolis ilin kun aplombo.

“Ĉu mi rajtas sidi kun vi du knabinoj?”

“Se vi volas”, heziteme respondis unu virino en kvieta tono.

“Malofte mi havas la plezuron lunĉi kun ĉi tiaj belulinoj,” li diris kaj ek-sidis.

“Mi estas juvelisto kaj posedas butikon en la urbego,” li daŭris, “kaj grandan domon apud la haveno, de kie mi povas vidi mian ankritan jakton.”

La du virinoj rigardis unu la alian kun konsterno. Estis evidente, ke ilin ege timigis neatendita blago. Senvorte ili stariĝis, kaj rapidis el la kafejo.

Stefano nun atingis sian hejmurbon. Subite li aŭdis ploradon, kiu eliris el la subfirmo en kiu li iam laboris. Ŝajnis al li ke lia eta filio estis trista.

Li decidis eltrovi la kaŭzon de la malgaja sono, sed unue li aĉetis kaj surmetis falsan barbon por ŝercrompi siajn amikojn. Tiam li eniris barbirejon por hartondo, sed en la seĝo li ekdormis. La razisto forrabis lian barbon, kaj kiam Stefano vekigis li kriis,

“Kie estas mia barbo?”

“Ĝi ne konvenis al via vizaĝkoloro. Jen alia, kiu pli taŭgas al vi.”

Kiam Stefano foriris, la razisto diris al si mem, “Kaj via barbo pli taŭgas al mi.”

Stefano eniris sian eksoficejon en la filio kaj demandis al la lamentantoj: “Kial vi ploras?”

“Ho, Stefano, la firmo havas multajn problemojn. Tiu aĉulo kiu ŝtelis vian postenon de vi detruis la maŝinaron, kaj neniu povas ripari ĝin.”

”Kio okazis?”

”Pupoj venis el la maŝinoj kun du kapoj, aŭ sen fingroj, aŭ kun okuloj sur la stomako, aŭ...”

”Montru la erarojn al mi.”

Tion ili faris, kaj kiam ili sukcese provis ĉiujn erarojn, Stefano sukcese ĝustigis la problemojn. La estro petegis lin reveni al lia posteno — je pli altigo de salajro, kompreneble.

La postan semajnfinojn li seligis Rosan kaj rajdis trans la monton, al kie Katrina atendis lin.

[Ĉi tiu rakonto estis premiita en la Speciala Konkurso 2004, laŭ kiu oni devis verki rakonton uzante aron da strangaj frazoj (en la rakonto-teksto ili estas substrekita) enorde. La premigajntaj verkintoj rajtos elekti valoran libron el listo provizota de la redaktoro de EJK.] □

VIA REDAKTORO DANKAS

pro la multaj kondolencokartoj kaj -leteroĵ senditaj al mi post la aperigo de la informo pri la morto de mia filo Peter (“Jaz”). Mi estas tre kortuŝita pro ili, kaj viaj korvarmigaj vortoj. Bonvolu ĉiuj akcepti miajn dankojn, kaj mian intencon plu servi vin malgraŭ la perdiĝo de mia intima kunlaboranto/filo.

Don Broadribb

KOREKTO

Sur paĝo 2 de nia novembro-decembra numero 2004 de EJK estas erare presite ke Pamela Lyndon Travers vivis 1899-1906. La ĝustaj datoj estas 1899-1996.



Por Ridigi Vin



Laŭte disputaĉas Brendano kaj Katarina.

“Ĝis nun mi neniam vidis idioton pli stultan ol vi!” elkrias la knabo.

“Neniam ekzistis idioteco pli profunda ol via!” rekrias la knabino.

“Infanoj, infanoj!” intervenas la patro, kiu provas legi la tagĵurnalon.
“Bonvolu ne forgesi, ke ankaŭ mi ĉeestas!” [el Tamen Plu]

INTERRETE

- DO YOU EVER THINK IT WOULD BE NICE TO GET A CHANCE TO CHAT with the Australian Esperanto community between Summer Schools? Do you ever wonder what the others are doing? Do you ever have an idea you'd like to suggest for Esperanto?

There is a way!

Join the Esperanto Australia Yahoo Group and you can send messages to the whole community and read what they have to say back. You can write in English or Esperanto. You can choose whether to receive mail in your mailbox or just to have the right to visit the website and read it there. Participation either way is not a virus risk and it is easy to cancel membership if you change your mind.

Membership is free and open to all interested, AEA members or not.

Just notify me at penivos@yahoo.com for registration.

I hope you'll join us.

Penny Vos-Pym

- MULTILINGUAL BICYCLE'S VOCABULARY / MULTLINGVA BICIKLO-VORTPROVIZO nun estas trovebla ĉe <http://bemi.free.fr/biciklo/>. Utila vortaro.
- ILUSTRITA KATALOGO DE ESPERANTO-POŝTMARKOJ eldonitaj de diversaj nacioj en la mondo troveblas ĉe <http://dauphin.guy.free.fr/debuland.htm>. La katalogo estas tre impona kaj tre rigardinda. Plene fidebla ĝi ne estas, ekzemple la informo ke Aŭstralio eldonis en 1986 poŝtmarkon *esperantan* pri la 21a I.P.A. Konferenco de International Police Association (36¢, blua) ŝajnas al mi duba. Kaj neniu bildo de tiu pretendata "esperanta" poŝtmarko montriĝas en la katalogo. Sed poŝtmarkokolektantoj tamen trovos la katalogon kaj interesa kaj bonaspekta.

[Pri la retadreso atentigis *RET-INFO*] □

- **La virtuala poeziema kulturklubo** estas organize sendependa ejo por ĉiuj aktivaj esperantistoj, kie kulturŝatantoj, poetoj kaj verkistoj povas prezenti siajn tekstojn. Ĉi tie oni povas diskuti pri poezio, literaturo, arto kaj pri aliaj kulturaj temoj. Poemoj, rakontoj, tradukoj, eseoj, fabeloj, artikoloj ks.

tekstoj estas ĉiuj tre bonvenaj. Ĉiu membro estas devigita almenaŭ unufoje monate sendi iun kontribuon. Ĉe http://groups.yahoo.com/group/esperanto_kulturo/.

[fonto: *RET-INFO*]

* **La reta Katalogo de UEA** iĝis ankaŭ grava deponejo de recenzoj pri esperantlingvaj verkoj. Nun krom pli ol 5000 libroj kaj 900 brokantaĵoj en la Katalogo oni povas trovi 770 recenzojn. Oni povas legi la recenzojn en la paĝoj de la recenzataj verkoj aŭ uzi specialan recenzan parton — kun propra serĉmekanismo, permesanta eĉ serĉi ene de la recenzoj. Se tio sonas interesa, bv. provi: <http://uea.org> kaj klaku sur “Katalogo”. [El *RET-INFO*]

• **Esperanto Radio-arkivo en la reto** troviĝas ĉe <http://www.radioarkivo.org>. Se vi deziras aŭskulti malnovajn radioelsendojn de diversaj espetantaj programoj, vi eble trovos ĉi tiun arkivon interesa. Aktualaj plejparte la arkivaĵoj ne estas. Sed ke oni konservas radioprogramojn esperantajn por posta aŭskultado estas bone. Atentu, se vi vizitas tiun retpaĝon, ke se vi muse klakas sur “Aŭsultu” vi ricevas nur etan Adobe GoLive-dosieron neutiligeblan; sed se vi klakas sur “Elŝutu” vi aŭdas la programon! Miso farita de la retpaĝopreparinto...

* Ĉe www.esperanto-turismo.com/ vi povas trovi multajn detalojn pri ekskursoj peresperantaj okazantaj dum la venontaj monatoj.

• **La nova retumilo *Mozilla Firefox***, havebla kaj por Windows kaj por Mac OS X, estas tre rekomendinda. Vi povas senpage elŝuti ĝin ĉe www.mozilla.org/products/

Ĝi estas rapida, sekura (!), protektata kontraŭ virusoj kc., kaj bone esperantumas. Senpaga epoŝta programo nomita Thunderbird ankaŭ haveblas ĉe la sama retadreso.

Vi ne plu devos suferi la idiosinkraziojn de *Internet Explorer* kaj la mikrosoftaj epoŝtoprogramoj.

• **Uzantoj de Mac OS X** trovos ke la aktuala versio de la stabila senpaga vortilo (“word processing program”) **ABIWORD** tre bone esperantumas (per unikodo), legas kaj skribas MICROSOFT-WORD-AĴOJN, kc. — Aliflanke, la vortilo **MELLEL** (US\$39) jam fariĝis unu el la plej popularaj vortiloj por OS X. Ĝi estas stabilega, kaj esperantlingva versio haveblas. □

LA PAC-BOATO

VERKIS PENNY VOS-PYM

La Pac-Boato estas Japana ne-por-profita organizaĵo. La ŝipo vojaĝas ĉirkaŭ la mondo tri-kaj-duonan fojojn jare je 3-monataj vojaĝoj, haltante ĉe proksimume 20 havenoj. Ĝi portas proksimume 900 pasaĝerojn en ĉiu vojaĝo kaj proponas programon de prelegantoj kaj agadoj dum la vojaĝo kaj ĉe ĉiu havenurbo. Plejparte, la pasaĝeraro estas japana kaj estas proksimume duone dividita inter prokrastinantaj studentoj kaj emerituloj. La Pac-boato portas ilin por renkonti civitanojn de aliaj landoj vizage-al vizaĝe por gajni personan komprenon de la vera situacio de la homaro kaj la interrelatoj inter homoj. Ĉirkaŭ 150 el ili pagas kroman sumon por havi “Globan Anglan Trejnadon” (GET) dum la vojaĝo kaj malpli granda nombro havas “Globan Hispanan Trejnadon” (GHT). Ili uzas tiujn lingvojn ĉe la havenurboj por komuniki kun la lokuloj dum mallonga gastigado. La lingvinstruistoj ne estas pagataj sed ricevas senpage gastigadon kaj manĝaĵojn kaj transportadon per la Pac-Boato.

La organizantoj jam konsentis, teorie, oferti “Globan Esperantan Trejnadon” kiel normalan GET-on. Japanoj havas malsaman situacion ol multaj rilate al siaj riĉeco sed mallibero vojaĝi internacie pro lingvoproblemoj. Esperanto povas doni al ili la sekurecon vojaĝi internacie per sia monda komunumo, ene kaj ekstere de la Pac-Boata sperto. Japanaj emerituloj ĝenerale ne havas la tempon lerni la anglan dekomence sed ĝojus malkovri esperanton kiel solvon kaj dividos tiun informon tre kredeble al siaj geonatoj. Miloj pli da riĉaj esperantonparolantaj japanaj emerituloj komencus havi efikon pri turismo.

- La potencialo de esperanto kiel propadeŭtika lingvo (lingvo lernata antaŭ la angla) en japanaj lernejoj iĝus pli politike akceptebla se pli da japanoj havus pozitivan sperton de lernado kaj uzado de ĝi.

- Multaj pasaĝeroj ŝategas la Pac-Boatan sperton kaj volus ripeti ĝin se ili ne devus retrovi la koston. La GET-(esperanto)-kurso proponas tiun eblecon ĉar la programo serĉos novajn instruistojn.

- Ekzistantaj esperantaj kursoj ĉirkaŭ la mondo povus komenci menciin instruadon ĉe la Pac-Boato kiel eblecon por diplomigontoj. Tio estas alloga, nekutima, taŭga, atingebla motivo por studado.

- La Pac-boato povus esti aparte bona instigo al evoluo de esperanto grupoj en la havenurboj per kreskigo de petado por esperanto-gastigado kaj

pro la ebleco de dungigo kiel instruistoj sur la boato.

Mi vidas eblecojn por kelkaj formoj aŭ ebloj de kunlaborado inter esperanto kaj la Pac-Boato:

- Prepari bonan prezentaĵon por montri al partoprenantoj sur la Pac-boato.
- Peti al partoprenantoj viziti esperantajn lernejojn por fari vidbendojn por nia esperanto-DVD.
- Sugesti al esperantistoj ke ili volontulu kiel angla- (aŭ hispana-) lingvaj instruistoj kaj krome diskuti/instrui esperanton.
- Trovu gastigantojn en ĉiuj havenurboj de la Pac-Boato. Instigi esperantistojn volontuli por instrui esperanton kiel GET-on sur la Pac-Boato.

Pli da informo pri la Pac-Boato estas troveble ĉe la retejo, serĉu “Peace Boat”. Mi esperas gajni subtenon de esperantistoj kiuj deziras kunlabori por fari programon inter la Pac-Boato kaj la esperanto-movado. Bonvolu kontakti min se vi interesiĝas!

Penny Vos-Pym

Aŭstralio

Penivos@yahoo.com

□

PRI LA VORTO “KROM”

La prepozicio “krom” antaŭ iu vorto signifas, ke tiu vorto staras ekster la temo de nia parolado, ke ni rigardas ĝin kiel ion apartan; tial ĝi povas havi egale bone la sencon de escepto kaj la sencon de aldono, depende de la cirkonstancoj, en kiuj ĝi estas uzata. “Krom” per si mem esprimas nek escepton, nek aldonon, ĝi esprimas nur apartigon; sed ĉu tiu apartigo estas farata por ion forigi, aŭ kontraŭe, por ĝin pli akcenti, tion montras la senco de la frazo mem. Ekzemple, kiam mi diras: “tie estis ĉiuj miaj fratoj krom Petro”, ĉiu komprenas, ke mi apartigas Petron, por montri, ke li ne estis inter la “ĉiuj” sed kiam mi diras: “krom Petro tie estis ankaŭ ĉiuj aliaj miaj fratoj”, oni facile komprenas, ke ĉi tie mi apartigis Petron nur tial, ke pri li ni jam parolis, aŭ pri li oni jam scias, ke li tie estis, aŭ ke li tie devis esti. Kompreneble, la vorto “krom” povas iufoje kaŭzi neprecizecon aŭ malkompreniĝon; sed en tiaj okazoj ni devas eviti la vorton “krom” kaj uzi anstataŭ ĝi la pli precizajn esprimojn “esceptinte” aŭ “ne sole, sed ankaŭ”.

L.L. Zamenhof, en *LINGVAJ RESPONDOJ*

OSIEK-PREMIO 2004

En 2003 la Osiek-anoj proponis 27 verkojn premiindajn: ĉiuj estis prezentitaj en la julia numero de *La Gazeto*. La 23an de julio, dum la IEK en Pécs, Hungario, sekreta voĉdonado atribuis la premion al

Ed BORSBOOM



pro
“Vivo de Andreo Cseh”

Gratulon!

La premio, 500 €, rekompencas vivantan aŭtoron pro publikigita verko ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro

informoj: *La Gazeto*, 55210 Creuè, Francio <http://osiek.org>

NIA KONKURSO “FACILA”

(EJK 71 (septembro-oktobro 2004, p.8)

RESPONDOJ

- (1) “Rozkolera aŭroro” estu “rozkolora aŭroro”.
 - (2) “Mola karesema *bate-to*” estu “mola karesema *kateto*”.
 - (3) Lia parolo estis *kurba* kaj konvinka” estu “lia parolo estis *kurta* kaj konvinka”.
 - (4) “Lin ege ĝojigis ŝia *salato* sur la strato” estu “lin ege ĝojigis ŝia *saluto* sur la strato”.
 - (5) “*Interruladaj* pretend-oj” estu “*interrilataj* pretendoj”.
 - (6) “Elspezinte lastan *dolaron*, li ĉagreniĝis” estu “elspezinte lastan *dolaron*, li ĉagreniĝis”.
- (7) “Lia granda *liberkapablo* estis mirinda por la kunlaborantoj” estu “lia granda *laborkapablo* estis mirinda por la kunlaborantoj”.
 - (8) “Ĉi tiu bazara *bubo* bezonis riparon” estu “ĉi tiu bazara *budo* bezonis riparon”.
 - (9) “Teda *bizara* bruo” estu “teda *bazara* bruo”. (Tamen: “teda *bizara* bruo” havas sencon, depende de la kunteksto.)
 - (10) “Fiere spiris la *bruto* de la venkinto” estu “fiere spiris la *brusto* de la

venkinto”.

- (11) “Ŝi trankvile *rastis* karoton por la barĉo” estu “ŝi trankvile *raspis* karoton por la barĉo”.
- (12) “La estro volonte *simulis* ajnan bonan iniciaton de la kunlaborantoj” estu “la estro volonte *stimulis* ajnan bonan iniciaton de la kunlaborantoj”.
- (13) “Simplaj kaj *apelitaj* literoj” estu “simplaj kaj *ĉapelitaj* literoj”.
- (14) “*Sango* de la prezidento ne devas okazi” estu “*ŝanĝo* de la prezidento ne devas okazi”.
- (15) “Li ofte *deliris* ŝin vidi” estu “li ofte *deziris* ŝin vidi”.
- (16) “Li havis kutimon esprimi sin per longaj, multvortaj, bizaraj *prepozicioj*” estu “li havis kutimon esprimi sin per longaj, multvortaj, bizaraj *propozicioj*”.
- (17) “Ilin ege timigis neatendita *blago*” estu “ilin ege timigis neatendita *blato*”.
- (18) “Lia eta *filio* estis trista” estu “lia eta *filo* estis trista”.
- (19) “La razisto *forrabis* lian barbon” estu “La razisto *forrazis* lian barbon”.
- (20) “Ili sukcese *provis* ĉiujn erarojn” estu “ili sukcese *trovis* ĉiujn erarojn”.

Perfektajn korektojn sendis: *Kay Andersen*, kiu gajnis per tio la novan poezilibron *Tie ĉi tie*, de Mikaelo Giŝpling.

NIA KONKURSO “NEFACILA”

Sendis tre lerte verkitajn premiitajn verkojn: Kay Andersen, Franciska Toubale kaj Gaye Phillips. Iliaj rakontoj aperos en la unuaj tri numeroj de *ESK* 2005. Ili elektos siajn premiojn (valorajn librojn) el listo provizota al ili de la redaktoro.

Al ĉiuj tri mi elkore gratulas.

Mi memorigas ke ĉiu persono rajtas kontribui al *ESK*, kaj ke elstaraj rakontoj ĉiam estos rekompencitaj per librodonaco. Sendu viajn kontribuojn, prefere epoŝte, al sudakruco@westnet.com.au, aŭ surpapere al *Esperanto sub la Suda Kruco*, PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio. [B]

TREVOR STEELE EN HINDIO



Katja kaj Trevor Steele pasigis kvar monatojn instruante esperanton en Hindio. Ilia gastiganto estis Venkatesh Reddy (sur la bildo kun Trevor ĉe taksiejo en la urbo Salem (en la ŝtato Tamil Nadu). Venkatesh donas novan impulson al nia movado en tiu landego.

Se vi volas helpi, vi povas sendi donacon al la UEA-konto Hind-Agado. Kio estas malgranda sumo en Australio povas esti tre utila en Hindio.

La retadreso de Trevor Steele estas: trevor_steele@myway.com. □



Por Ridigi Vin



EDZIĜA MALHELPO

“Kial dissolviĝis la fianĉeco de Ella? Ĉi ja tiel multe amis sian fianĉon?”

“Ĉi eksciis, ke ĉe la altaro ŝi devos ĵure promesi, ke ŝi neniam forlasos sian edzon, sed sekvos lin ĉien.

“Ĉu tio estas kaŭzo?”

“Jes ja, ĉar ŝia fianĉo estis subakvisto ĉe la maristaro.” [El *La ondo de esperanto*]

SCHOLARSHIP PROGRAM

We are still receiving enquiries from teachers interested in our scholarship program, to encourage the use of Esperanto in Australian schools.

Five Esperanto Scholarships have been awarded so far and those recipients are now looking forward to a trip to Adelaide in January 2005 to study Esperanto at the Australian Esperanto Summer School.

Esperanto scholarships are available to qualified teachers and final year student teachers within Australia and application forms are available from state Esperanto organizations.

Interested Western Australian teachers can find out more about Esperanto at HYPERLINK "<http://www.multiculturalwa.net.au/elwa>" www.multiculturalwa.net.au/elwa To request an application form please contact HYPERLINK:

"mailto:esperantowa@hotmail.com" esperantowa@hotmail.com or Telephone (08) 9307 1964.

Sarah Durling – Parkerville.

Terri Fitzgerald – Darlington.

Merradean Pettit – Darlington.

Yvonne Siegwart – Mullaloo.

Michelle Weeks – Wanneroo.

Congratulations to the above teachers, who have recently been awarded Esperanto Scholarships.

Some winners have previous experience in language studies and others are learning a second language for the first time. All are enthusiastic about Esperanto and will be seeking opportunities to teach it in Australian schools in the future.

Stage One of the scholarship is an introductory course of ten Esperanto lessons; using a brand new CDROM course produced in Belgium.

Stage Two will take them to Adelaide in January for a 12 day Esperanto Summer School.

We wish them every success in this joint venture.

LOTE Teaching Aids Catalogue 2005

The next LOTE Teaching Aids catalogue will include a Word Search Book ...

TROVU LA VORTOJN

→

They have a range of Esperanto classroom resource materials equal to any LOTE language taught in Australian schools.

This is great news for Esperanto teachers!

You can order the 2005 LOTE Teaching Aids catalogue on HYPERLINK “<http://www.loteteach.com>” www.loteteach.com or give them a call on Tel: 9470 9186. [El LA NIGRA CIGNO] □

PRI LA “FIDEBLECO” DE LINGVOJ

DE JOHANO PETIKEL

Marcel Leereveld en sia artikolo titolita “Ĉu esperanto forfalos en dialektojn?” (*ESK*, n-ro 72) asertas ke esperanto, por povi ŝajni inda je eklerno al lingvolernantoj kaj por ne disfali en dialektojn, devas rigide resti neŝanĝita.

La ideo mem estas ne nova (maksimume nur la uzo de la vorto “fidebleco” ĉi-rilate), ĝin (kvankam ne sen kontraŭdiroj) traktis eĉ Zamenhof mem kaj ĝi re- kaj reaperas en publikaj diskutmaterialoj. Trovante la temon fundamente grava, mi ne povas reteni min de reago.

Unue, mi dubas ke etnaj lingvoj estas tiel ŝanĝiĝemaj, kiaj la aŭtoro asertas ilin. Kiel ĉio en la mondo, tiel ankaŭ la lingvoj — inter ili ankaŭ la artefaritaj — ŝanĝiĝas, kaj en ĉi tio estas nenio malnatura, nek malalloga. Ĝi tamen ŝanĝiĝas ne tiel rapide, ke partoprenantoj de kursoj pri iu ajn etna lingvo devu kalkuli kun la malagrablo, ke dum la kurso la lernota lingvo nere-koneble ŝanĝiĝos. Tio eblas, ke kelkaj novaj vortoj — precipe teĥnikaj terminoj — enradikiĝas eĉ en kelkaj monatoj (vd. ĝuste niatempoj la terminojn de la komputila, interreta fakliteraturo), sed la inertoforto de la baza vortostoko en ĉiuj lingvoj estas tro granda por ke esencaj ŝanĝiĝoj povu eĉ en kelkaj jaroj okazi.

Gramatikaj ŝanĝiĝoj okazas en tempo ankoraŭ pli longa. La ŝanĝiĝo de esperanto estas afero jam multe pli profunde observenda, kvankam ne tute pro la konsideroj menciitaj de s-ano Leereveld en la entema artikolo. La aŭtoro esence pravas dirante ke sekve de senĉesaj ŝanĝoj ankaŭ esperanto povus disfali en dialektojn kaj ke la plimulto de Esperantaj neologismoj, fonanta el nesufiĉa kono de la baza Esperanta vortostoko, estas superflua, senmotiva.

Lia argumentado tamen estas pli teoria ol praktike grava, ĉar esperanto estas jam multe pli matura ol ke ni devu timi pri la lingvo pro ĉi tiaj danĝeroj (kvankam la aŭtoro kontraŭdiras al sia direndaĵo uzante la nediveneblan neologismon (?) “ante” ...). Ĉi tiel, s-ano Leereveld, vole-nevole plifortigas la konservemon kazakterizantan la tutan esperantistaron rilate esperanton, preter kiu facilanime pasi mi ne povas.

Mi eble ne eraras supozante, ke, se voli formi la statuton pri la konservismo, ni devus elekti iun esperantiston por pozi (la plej taŭga figuro estus iu nia akademiano [eble la tuta kompanio]). La konservemo de la tuta esperantistaro (escepte eble nur la italajn radikalulojn) estas tiel granda, ke ni povus trankvile nomi la esperantistaron anaro de religio kun propra biblio (la *Fundamento*) kaj Dio (Zamenhof). Tiu ĉi anaro obstine kaj daŭre insistas pri sia kutimo rifuzi ĉiun agad-proponon escepte de la vizitado al propraj diservoj (kongresoj, klubkunvenoj k.s.) kaj ĉiun inviton serioze kaj profunde ekpensi pri la “hereza” lanĉaĵo, ke eĉ en la lingvo esperanto mem estas ne ĉio tute en ordo.

Por certigi la konservemon, la esperantistaro instituciigis sian konduton establante la korporacion nomitan Akademio de Esperanto (respondan al la Sankta Tribunalo en la mezepoka Vatikano) kaj determinante ĉi ties celon deove kaj kategorie rifuzi ĉiun lingvomodifan proponon eventuale leviĝantan en la subularo.

Sed, ĉar herezaj ideoj povas ankaŭ rilate la movadan agadon (strategion k.s.) leviĝi, esperantistoj establis korporacion ankaŭ por subpremi ĉi tiujn herezaĵojn — ĉi tiel estiĝis esperantistaj landaj, fakaj kaj tegmentaj esperant-organizaĵoj, kies gvidantoj penas konsciencie plenumi ĉi tiun taskon. Mi ne scias ĉu s-ano Leereveld apartenas al nia Sankta Tribunalo aŭ okupas altan pozicion en la Aŭstralia movado (kies kondiĉo ĉie en Esperantujo, laŭ nefiks-itaj “reguloj”, estas ĵuro pri fideleco al la Fundamento, persisto en konservemo), lia manifestiĝo ĉiukaze sugestas ke mi eble ne tre eraras en ĉi tiuj suspektoj. Ĉar ĉiu kritiko (do ankaŭ la supra) valoras neniom sen pruvoj, motivoj, mi estas preta prezenti ankaŭ ĉi tiujn, se la redaktistaro de *EFK* montrus emon publikigi ankaŭ ilin.

jpetik@freemail.hu

MODERNA EDZIĜO

“Ho, kara patro, mia edzino sidas dum la tuta nokto en la briĝ-klubo kaj se mi nur unu erareton faras en la kuirado, ŝi faras teruran skandalon...”

[El *La ondo de esperanto*]

LA TAGO KIAM LA MONDO

HALTIS

RECENZITA DE TONY PETERSON

Kun Michael Rennie kiel Klatuu, Patricia Neal kiel Mrs. Benson, Billy Gray kiel Bobby, ankaŭ Jaffe kiel Professor Bernhardt kaj Hugh Marlowe kiel Tom.

Reĝisoro: Robert Wise. Muziko originala de Bernard Hermann.

LA TAGO KIAM LA MONDO HALTIS estas sciencfikci-filmo kiu, malgraŭ evidente malalta buĝeto, ne perdis sian valoron kaj estas interesa hodiaŭ kiel en 1951.

Kiam la filmo estis farita, Usono havis paranojn pri komunistoj. Similas al nia hodiaŭa timo pri islama terorismo. Ĉiu perceptata kiel malsama estis ankaŭ perceptata kiel ia minaco, do la filmo temas pri iu el tre malproksime, iu diferenca (kvankam envere ne tre diferenca) kiu penas partopreni en la socio.

Esence la rakonto temas pri du aliplaneduloj, Klatuu kaj Gort, kiuj alvenas en Vaŝingtonon per belaspekta spacŝipo. Klatuu alvenis al la tero por doni al ni gravan mesaĝon pri la estonteco de nia planedo, sed anstataŭ bonvenigi la aliplanedulon al la tero, la pafemaj usonanoj pafas lin. Li estas prenita al malsanulejo, ekzamenita, kaj enkarcerigita ĝis la registaro decidis kion fari pri li.

Klatuu eskapas, prenas la nomon “Ĉarpentisto”, kaj ekloĝas en gastejo, por konatiĝi kun la Teruloj, kiuj estas nun historiaj pro lia sukceso eskapi!

Li amikiĝas kun vidvino nomata Sinjorino Benson, kaj kun ŝia filo, Bobby, li havas amikan rilaton. Bobby prezentas Klatuun al Profesoro Bernhardt, kiu aranĝas kunvenon por Klatuu kun ĉiuj ĉefsciencistoj en Usono.

Klatuu timige demonstros praktike al la kunveno kapablon neŭtraliigi la elektron de la mondo, kaj por 30 minutoj la mondo kvazaŭ haltas. Nenio moviĝas kaj la popolo de la mondo estis plena de timo.

Klatuu avertas la profesoron ke ĉi tio estas ĝuste kio okazos se la Teruloj ne ekkonscios pri sia agado. Tiu mesaĝo estas ankoraŭ grava hodiaŭ. Iu popolo ĉiam militas ie en la mondo.

Interese, ĉar ĉi tiu filmo faris grandegan impreson al mia menso, ĝi vekis mian intereson pri lingvoj kiam mi vidis ĝin en 1968. Tiam mi estis nur 13-

jara.

→

Dum kelkaj scenoj en la filmo, Klatuu parolas sian propran lingvon, kaj aŭdante la vortojn nun, ili sonas similaj al Esperanto!

Unu frazo de la dialogo de la filmo estas: “Klatuu barada nikto”. Ni neniam eltrovas kion la vortoj signifas, sed ĝi ja savas lian vivon en unu epizodo en la filmo. Tuj kiam mi aŭdis la vortojn, mi komencis kreii miajn proprajn vortojn! Junuloj estis tre impresiĝemaj!

La filmo finiĝas kun fina averto de Klatuu al la mondo: detruu la mondon, sed ne perturbu la universon!

Li diras al ĉiuj ke lia helpisto, Gort, apartenas al Universa Polico de Robotoj kiu detruos sentime ĉiun ajn planedon kiu malobeas la universan leĝon de paco! Klatuu diris al ni ke ni havas neniun alian elekton.

Mortigi por paco estas ankoraŭ kun ni en la mondo hodiaŭ.

Je la fino de la filmo, la spacŝipo rapide foriras, kaj postlasas la popolon de nia mondo pensi pri la parolado de Klatuu.

Ĉi tiu filmo havas multajn tavolojn kaj enhavas multaj kaŝitajn signifojn kaj teoriojn: unu estas ke la ternomo kiun Klatuu adoptis, “Ĉarpentisto”, aludas al Jesuo Kristo. Kaj ja simile al Jesuo, Klatuu alvenas al la Tero, kaj donas al ni mesaĝojn pri nia destino, kiujn neniuj volas aŭdi!

La reĝisoro de la filmo, Robert Wise, recevis du *Oscar*-ojn pro siaj filmoj, *WEST SIDE STORY* kaj *THE SOUND OF MUSIC*, sed ili neniam estas tiel brilaj kiel *LA TAGO KIAM LA TERO HALTIS*.

Ĝi estas mia plej ŝatata filmo. Kia mirinda sperto! □

MORTIS JOHAN HAMMOND ROSBACH

Honora membro de UEA, la norvega esperanto-verkisto Johan Hammond Rosbach forpasis la 7-an de septembro 2004. Li estis naskita la 22-an de aŭgusto 1921. Rosbach estis membro de UEA ekde 1947 kaj ĝia honora membro ekde 1991. Ekde 1951 li servis ankaŭ kiel delegito kaj fakdelegito pri lingvoj. Al la Akademio de Esperanto li apartenis ekde 1962. Rosbach aktivis ankaŭ en la landa movado, i.a. kiel ĉefredaktoro de *Norvega Esperantisto* dum 25 jaroj. La internacia publiko tamen konas lin antaŭ ĉio kiel tre produkt-eman esperantan proziston, inter kies rakontaroj kaj romanoj precipe elstaras la romano *Fianĉo de l' sorto* (1977). [fonto: *RET-INFO*] □

SIN KONIGAS SAMIDEANO

Mi nomiĝas Claude FERRAND, (57).

Mi prenos parton en la januara somerkursaro en Adelajdo.

Mi loĝas en Normandio en la urbo Caen en okcidenta parto de Francio. Tie okazis la elŝipejo la 6 an de Junio de 1944. Ĝis nune mi laboris en poŝt-oficejo.

Post la somerkursaro mi ŝatus vojaĝi, renkonti pli da samideanoj tra Aŭstralio kaj sperti partojn de via granda kontinento.

Mi dezirus vidi: Sidnejon, Tasmanion, dezertojn, Uluru-n, *outbacks*. Mi konscias ke mi ne povas ĉion elekti (tiom da mirindaĵoj).

Mi parolas la anglan.

Se iu volas viziti Francion mi povas akcepti lin/ŝin.

Claude Ferrand

15 Place Venoise

Caen 14000

Francio

claude.ferrand@club-internet.fr



Por Ridigi Vin



MISKOMPRENO

“Kiam mi vojaĝis en Afriko, precize je noktomezo mi aŭdis teruran blekon de leono. Mi elkuris el la tendo, prenis rapide la pafilon kaj mortpafis la leonon en nokta ĉemizo...”

“Nu, tion mi tamen ne kredas! Kiel povis esti la leono en nokta ĉemizo?”

Kelnero donas al la kliento menuon kaj proponas:

“ Specialaĵo de nia restoracio estas limakoj!”

“ Jes, jes, mi scias... Hieraŭ mi estis servata de unu el ili!”

“ Kelnero! Ĉu vi servas sardinojn?”

“Jes, ja. Kiujn Vi deziras — portugaliajn, hispaniajn, italiajn, francajn?...”

“Tute egale! Mi ja ne interparolos kun ili.”

[El *La ondo de esperanto*]

FOR THE BEGINNER

BY DONALD BROADRIBB

Word: Various languages have very different ideas of what is to be written as one word or more than one. For example, in English we count “the books” as two words; in Hebrew it is written as one word: הספרים. In English we consider “I will go” as three words; in French it is as one word, *j'irai*.

It seems to have been only well after 1000 B.C. that spaces were introduced in order to separate groups of sounds. The principle of where the spaces were placed differed from language to language, and place to place. Only in Greek times, not long before 600 B.C., the sort of writing system we are familiar with now was introduced, although the idea of upper case and lower case letters came much later.

At the end of the 1800s A.D., some linguists began to question our traditional concept of words. The initiator of Esperanto, L. L. Zamenhof, was the son of a linguist, and appears to have early on become acquainted with the “new linguistics” being developed at the end of the 19th century. He was also thoroughly familiar with Hebrew, which has a sufficiently different concept of “word” to give him pause. When he published his first book on Esperanto in 1887, he gave the term “word” a new meaning which the new linguistics came to call “morpheme”. In his first published writings on Esperanto he wrote such a phrase as “li venis frue al mia loĝejo” as *li ven'is fru'e al mi'a loĝ'ejo*, and he said that this phrase consists of 12 “words”, i.e. independent unvarying parts. And this is the basic concept of “word construction” in Esperanto.

We will now turn to a very different topic:

* * *

A BEGINNER'S GUIDE TO THE USE OF -N

Probably nothing in Esperanto grammar is more confusing to a beginning student than the use of *-n*. Most textbooks, well meaning as their authors may have been, leave the student more confused than when she started. And this is no surprise, because the traditional textbooks call the use of *-n* the “accusative case” or “the objective case”, and assume that somehow the stu-

dent will know what this is about. I intend to take a very different approach in this *Guide*.

Usually when we speak or write, we group what we say into statements which we have been taught to call “sentences”. Let’s take a fairly simple sentence, which I have chosen at random from a novel I am currently reading: “Cardoza read part of the column aloud over the phone.”¹

We could translate this into Esperanto as:

“Kardozo voĉlegis pertelefone kolumnoparton.”

This sentence describes a person doing something. The person is named **Kardozo**, and in grammar this is called the “subject”, which means: the person or thing that is doing something.

It then states what the person does: “**voĉlegis**”. This is called the “verb”. A verb is a statement of some sort of action.

(Voĉlegis is made from *voĉ* = “voice”, *leg* = “read”, *is* = “past time”. Why *voĉ* and not *laŭt*? Because we are really just distinguishing between silent reading and reading aloud, not to the sound volume which is what *laŭt* refers to.

“**Pertelefone**” (“by phone”) is called an “adverb”, which means the manner in which something is done.

(Pertelefone is made from *per* = “by means of”, *telefon* = “telephone”, *e* = adverb-marker.

If we want, we can say *per telefono*, they are equally good ways of saying the same thing.))

“**Kolumnoparton**” is called the “object of the verb”, what the action is done to.

(Kolumnoparton is made from *kolumn* = “column”, *o* = noun-marker, used here to make the term pronounceable, *part* = “part”, *o* = noun-marker]

Why the -n?

When we examine the use of the word *kolumnoparton* we may suspect that the *-n* is a marker to show us what the action was done to. A person (Kardozo) + did something (read) + what he did it to (part of a column).

1. *Tourist Season* by Carl Hiaasen. Pan Books, London, 2004, p.383.

There are other possible translations of the same sentence, which will give the same meaning but in different ways. We could, for example, translate it: *Kardozo voĉlegis parton de la kolumno uzante la telefonon*. What are the *-n*'s doing here? Pretty much the same thing:

What did Kardozo read aloud? A part of something. It doesn't much matter "a part of what?" A part of anything. What he read was a "part". You might notice that it was *kolumnoparton* in our first translation, and *parton* in our second translation. In both instances it is the *part* that is followed by *o* and *n*. The *kolumno* in both instances merely specifies the sort of *part* it is. It could equally well have been a *poem* (*poemparton* or *parton de poemo*) or even a soup-can label (*ladsupetikedon* or *etikedon de ladsupo*).

Principle #1: *-n* is used to indicate that something or someone is the "victim", so to speak, of an action. It indicates that this something or something is the **direct** victim, there is nothing indirect about it. If I merely throw something towards you, I may or may not hit you; but if I bash (*disbata*) your face in, your face (*vian vizaĝon*) is very certainly a victim of my action.

Well, let's look at something less violent, let's visit Paris:

Paŭlino atingos Parizon per aviadilo. (Pauline will get to Paris by plane.)

OK. That is straightforward enough. We could, of course, say *peraviadile* if we preferred. Just as *per telefono* and *pertelefone* mean much the same thing.

Paŭlino — that's the person doing the action, the "subject" of our sentence.

Atingos — that's the action, the "verb". It could be translated in a variety of ways, all meaning the same thing. "Will reach", for instance.

Parizon — that's the "victim" this time, if we take "victim" in a very wide, metaphorical sense.

What's wrong then with *Paŭlino iros Parizon per aviadilo*? Well, nothing. It's perfectly good Esperanto. It's just English that doesn't like it. "Pauline will go Paris by plane." What's wrong with that? We are allowed to say "Pauline will go home by plane" and that's OK. — Well, English is funny that way, it allows you to use some phrases but not others, for no apparent reason. It's just tradition. In English we are forced to say "Pauline will go to Paris by plane" for no particularly good reason, but we are forbidden to say

“Pauline will go to home by plane”, again for no good reason.

Esperanto is perfectly happy for us to say it either way:

Paŭlino iros Parizon per aviadilo

Paŭlino iros al Parizo per aviadilo

The one is as good as the other.

When we consider it that way, we can see that some other uncertainties which English speaking students occasionally have in writing or speaking Esperanto are equally easily solved.

What is the difference between *Johano rigardis al ŝi* and *Johano rigardis ŝin*? Certainly from the point of view of meaning, there is no difference. They are both equally valid ways of expressing the thought. In Esperanto.

The problem is that *in English* we are required to say “John looks at her” but “John watches her”. Why the difference “at” one time, but not the other? Essentially, because tradition says so.

Adding to the confusion, in English we say “John looks her in the eye”, and we are not allowed to say “John looks at her in the eye”. This sort of thing is a problem of the oddities of English grammar. Rarely if ever are we allowed to say “looks her”, we are forced to say “looks at her”.

Esperanto is, again, happy either way: *Johano rigardas ŝin en la okuloj* or *Johano rigardas al ŝi en la okuloj*.

Question: Why, since *ŝi* is the object of John’s looking, don’t we use that *n* both times?

Answer: Because *al* really, when all is said and done, simply shows direction, “towards”. “Her” is not a “victim” here, just a sort of bystander.

Question: Suppose “we send her a letter,” how do we express that?

Answer: Well, what is it that we actually send? Do we pick her up and send *her*, or do we pick up a letter and send *it*? Put that way, the question answers itself: *Ni sendas al ŝi leteron*.

On the other hand, if we “send her to the shop”, it’s the other way around: *Ni sendas ŝin al la butiko*. This time “her” is what we send, and “to the shop” indicates the direction.

What troubles many beginners is such a sentence as “He is a judge” = *Li estas juĝisto*. Why no *n*? Because nothing is being done, in that sentence. No action, no *n*. [To be continued.]

NOVA POŝTMARKO AŬSTRIA



La 1an de julio 2004 en Aŭstrio aperis nova poŝtmarko Esperanto 2004. La germana gazeto *Esperanto aktuell* klarigas ke:

“La 1 julio 2004 aperis en Aŭstrio, okaze de la pligrandigo de Eŭropa Unio, poŝtmarko “Esperanto 2004”. La markobildo montras 20-groŝan markon, kiu aperis okaze de esperanto-kongreso en Graz 1949, kaj la vorton ‘Saluton!!!’ La valoro de la poŝtmarko, kiu nur en Aŭstrio validas por enpoŝtigo, estas €0,55.

“En Aŭstrio jam de iom da tempo eblas private eldonigi poŝtmarkojn, kondiĉe ke oni estas preta pagi altan prezon por tio. Kompreneble la reklamefiko estas enorma. Ĉar la markoj estas validaj afrankiloj, temas pri rekonata kolektindaĵo, kiu pro sia tre malgranda eldonnombro estas dezirata de kolektantoj, precipe se ili estis uzitaj sur pruveble malfalsaj perpoŝte senditaj leteroj.”

[Laŭ *ESPERANTO-AKTUELL* 4/04.]

W.A.

VIZITO DE JAPANA AMIKO

RAPORTAS VERA PAYNE

La 12-an ĝis la 17-a de Oktobro vizitis Perton S-ro Masayuki Otsuki (“Saionji” al siaj amikoj). Gastigis lin tre bonkore Joe kaj Patsy Somogyi, en Ferndale. Joe ne ĝuas bonan sanstaton nuntempe, do estis aparte afable ke li kaj lia edzino malfermis sian hejmon dum kelkaj tagoj al alilanda esperantisto.

S-ro Otsuki venis precipe por foti la “sovaĝflorojn” (indiĝenajn florojn), kaj tiucele Barrie kaj Vera veturigis lin al King’s Park kaj al Wireless Hill. En la Parko de la Reĝo la floroj ankoraŭ belegas amase, kaj sur la Monteto Radio

oni konservas en tute natura stato la lokajn plantojn. Ni feliĉe trovis du Araneo-Orkideojn, ĉar jam finiĝis la florotempo por ili. Saionji prenis multajn fotojn — feliĉe la vetero estis perfekta. Patsy ankaŭ estis veturiginta Saionji-n kiam li unue alvenis.

Ni (B kaj V) estis la gastoj por vespermanĝo ĉe la hejmo Somogyi la antaŭan vesperon, kio estis tre agrabla okazaĵo, kvankam kara Joe ja suferis doloregon.

S-ro Otsuki estas profesia praktikanto de la naturkuraca metodo Yumeiho, kiu estas terapio por helpi homojn suferantajn diversajn malsanojn. Vi povas legi pli pri tio sur p.78 de la 2004a *Gvidlibro* de UEA.



Por Ridigi Vin



KLIENTO EN RESTORACIO DEMANDAS KELNERON:

“Ĉu Vi havas kotleton?”

“Ne.”

“Kaj kokidon?”

“Ne.”

“Kaj eble fiŝon?”

“Ankaŭ ne.”

“Kaj kion vi havas?”

“Nazkataron.”

“Ĉu en ĉi restoracio oni ofte ŝanĝas tablotukojn?”

“Jes, ja, sinjoro! Ĉi tiu el via tablo dum unu semajno kuŝis sur tiu tablo kaj pli frue sur la alia.”

Kliento diras al kelnerino:

“Mi petas malvarman teon kaj trasalitan ovaĵon. Aha! Kaj vi sidu ĉe mi kaj parolu sensencaĵojn.”

“Ĉu vi freneziĝis?”

“Ne! Simple mia edzino veturis sanatorion kaj mankas ŝi al mi.”

[El *La ondo de esperanto*]

INDEKSO 2004

67 = januaro-februaro

69 = marto-aprilo

69 = majo-junio

70 = julio-aŭgusto

71 = septembro-oktobro

72 = novembro-decembro

AEA/NZEA

AEA estraro 2004. 68:15

AEA Membership. 71:28

Alvoko al la ordinara ĝenerala kunsido de AEA. 72:9

La AEA/ZEA kongreso 2004.(de Sandor Horvath, Hazel Green, Francista Toubale). 68:3

Fotoj el la kongreso. 68:8

New Zealand Esperanto Association Congresss 2005. 71:15

Protokolo de la ĝenerala kunveno de AEA Brisbano januaro 2004. (69:23)

Treasurer's Report for year ending 30 June 2003. 68:27

What is the AEA? (by Penny Vos Pym). 70:7

Benino: Esperanto-akvoputo en la lernejo J.V. en Benino. 68:26

Deziras korespondi: 67:9, 68:21, 69:14, 70:12

Ekzamenoj:

Sukcesis en la ekzamenoj: 67:11, 68:15

Esperanto-eventoj:

“Foriro”. (de Terry Manley). 68:6

La 90a japana kongreso de Esperanto plurreligiejo (de Paul Desailly). 67:27

Nesto (de Etulinka): 67:16

Nova ZEO en Kanbero. (de Margaret Furness). 72:10

Vizito al Burrinja Artgalerio (de Kam Lee kaj Franciska Toubale). 67:25

World Language Expo. (by Penny Vos-Pym). 72:23

For the Beginner:

An Interesting Story and Small Competition. 67:21

Jargon (1). (by Donald Broadribb). 69:15

Jargon (2). (by Donald Broadribb). 70:13

Jargon (3). (by Donald Broadribb). 71:21

Jargon (4). (by donald Broadribb). 72:11

Historio de Esperanto en Aŭstralio. 68:16, 69:12

Indonezio:

Granda ŝanco helpi al Indonezio. (de Jennifer Bishop). 69:29

Interrete: 67:12, 68:22, 70:17

Klerigŭ per esperanto. (de Hazel Green.) 70:19

Konkursoj: 71:8

Libroj kaj recenzoj:

100 Jahre der Zeit voraus. 100 Jahre Esperanto in Hamburg, red. Benno Klehr. (rec. Donald Broadribb). 70:12

Baza legolisto de la originala esperanta literaturo. (de William Auld). 67:14

El coche de pedaloj. (filmo). 70:27

English-Esperanto Esperanto-English Mini Dictionary, de Edmund Grimley Evans. (rec. Donald Broadribb). 68:22

Edu-KoDo, red. Katalin Kováts. 71:19.

R.U.R. de Karel Čapek. (rec. Donald Broadribb). 72:4

Rusa novelaro volumo 1. (rec. Donald Broadribb). 69:9

The Friend from Kananam, by Kenneth G. Linton. (rec. Donald Broadribb). 71:18

Lingvaj temoj:

Ĉu esperanto forfalos en dialektojn? (de Marcel Leereveld kaj Donald Broadribb). 72:19

Ĉu vere lingvo=penso? Eseo de la redaktoro. 67:1

Diverseco kontraŭ malvarieco. (de Marcel Leereveld). 71:16

Komento pri eseo de la redaktoro: "Ĉu vere lingvo = penso". (de Kep Enderby). 70:11

La korelativoj. (de Marcel Leereveld). 69:20

La specialeco en la esperanta vortformado. (de Marcel Leereveld). 70:22

Respondo al la eseo de la redaktisto. (de Marcel Leereveld). 69:10

Tutmondigo kaj lingvoj. (de Santiago Torné). 68:17

Literaturo:

Aventuroj de kopenhagano. (de Bob Felby). 71:10

Ĉu gravas do la nomo? (de Katarina Mortimer). 68:19

Elektro kaj la paranormalo! Ĉu estas interrilato inter ili? (de Frank Swift). 68:13

Esperanto por plezurigi vin — drameto (de Terry Manley). 69:5

Feliĉaj memoroj pri miaj fruaj jaroj. (de Kay Andersen). 68:10

La azeno kaj la ŝtelistoj. (de Lilli Giloteaux). 72:3
La malfeliĉa mardo kaj la feliĉa bufo. (68:5)
La marvirino — sensencaĵa poemo (de Gaye Phillips) 69:3
Trevor Steele raportas el Hindio. 70:9
Unika birdo kakapo. (de Phillip Temple). 70:3

Litovio: 68:21

Montessori: Afiŝoj kreitaj de lernantoj en la Montessori-lernejo Treetops.
70:20

Odlo Bokserp: 67:29, 71:30, 72:29

Pseŭdodlobokserp. 70:29

Pasporta servo: 71:26

Personoj:

Clara Gleeson. (obituary, by Elaine Meredith). 71:8

Desmond J. Langman. (nekrologo, de Dave Dewar). 71:25

Eddie Desailly. 69:19

Georges Lagrange mortis. 70:27

John Harvey. (nekrologo, de Shirley Gradussov). 72:6

Marjorie Ellyard. (nekrologo, de Jennifer Bishop). 68:18

Peter Broadribb. (nekrologo, de Donald Broadribb). 72:7

Stan Bruton. (nekrologo, de Marcel Leereveld). 71:25

Teresa Metherall (nekrologo, de Jennifer Bishop). 70:28

Trevor Steele demisiis. 67:11

Trevor kaj Katja Steele. 69:8

Vagabondo hejme? Intervjuo kun Trevor Steele. 72:26

Radio 3ZZZ: 71:26

Raportoj:

Impresoj, komentoj, pensoj pri Ĉinio kaj la 89a Universala Kongreso. (de Sandor Horvath). 71:3

Internacia fotokonkurso. 71:27.

Korespondkurso servo de AEA 2003. (de Hazel Green). 68:16

Vizito al Kakadu. (de Franciska Toubale). 71:6

Regionoj:

ACT: 70:28

NSW: 68:24, 69:30. 70:28, 72:25

Esperanto en Novkastelo (de Franciska Toubale kaj Jonathan Moylan).
67:19

Novkastela Esperanto-Societo. 68:24

Qld: 69:30

Sudaŭstralio: 68:25, 71:28

Vic: 69:30

Skribas la legantoj:

Bob Felby. 72:16

David Whitmore. 68:23

Dianne Lukes. 72:17

Jonathan Moylan. 68:23

Paul Desailly. 68:23

Sandor Horvath. 72:16

Volo Gueltling. 71:20, 72:18



Por Ridigi Vin



SPRITAJ SPLITTOJ KAJ PRESKERAROJ

Rimarkis Ionel Oneț

AL PLI FREŜA AERO PER INSPIRO DE L' ESPERO

Posttagmeze ni profitis la belegan veteron kaj ekskursis al Poiana Brasov, kie ni promenis inspirante freŝan aeron. (*Aurora Bute, Raporto pri la Esperanto-Kongreso kaj Simpozio de Esperanto-Asocio de Rumanio, 6 majo 2004.*)

MONTRENDAJ IDOJ

Internacia infan-ekspozicio... (Internacia Pedagogia Revuo. 1997: 1)

HO, MIA PLEŬR!

Kian mirindan gazetaran kampanjon en *le Monde pri Esperanto* ni pleure malkovris pasintsabate! (*Le Monde de l'Espéranto* 2003: maj-junio) ["pleŭro: Sereca membrano, kiu surkovras la internon de la brusto kaj tegas la pulmojn"].

IO PUTRIS EN KOREIO

... ni... estis sub la premo de kelkaj stranguloj, ke ni serĉu alternativan lokon por la 79a UK, ĉar la cirkonstancoj odoris je malsukereco kaj eventuala milito. (*La Lanterno Azia* 1995: marto/aprilo) [El *La ondo de esperanto*]

LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

<http://www.esperanto.org.au>

PREZIDANTO: Matthew Maguire, 4 Nioka Rd, Narrabeen NSW 2101

VICPREZIDANTOJ:

Sandor Horvath, 31 Addison Rd, Black Forest, SA 5035. (08) 8297 6249
sandor.horvath@unisa.edu.au

Jennifer Bishop, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122. esperanto@education.monash.edu.au

SEKRETARIO: John Gallagher, 81 Lalla Rd, Lillydale Tas 7268. esperantojohn@bigpond.com

HELPSEKRETARIO: Henry Broadbent, 63 Kennedy Rd, Somers Vic 3927. (03) 5983 2731.
henryb@peninsula.hotkey.net.au

KASISTO: Stephen Pitney, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122. pitney@goldenit.net.au

HELPSKASISTO: Ken Rolls, 31 Miller Crescent, Mount Waverley Vic 3149.
kenjohnrolls@yahoo.com.au

Kotizoj: \$Aŭ30 por individuo aŭ klubo (+\$5 for familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Sendu vian kotizon al la kasisto.

LA NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIO

<http://www.esperanto.org.nz>

PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035

PREZIDANTO: Bradley McDonald, ĉe la asocia adreso. bradley.m@xtra.co.nz

SEKRETARIO: Howard Gravatt, ĉe la asocia adreso. hgravatt@ihug.co.nz

KASISTO: Jackie Fox, ĉe la asocia adreso.

Kotizoj: \$NZ40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Sendu vian kotizon al la kasisto.

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio. ☎ (08) 9641 1937, 📠 (08) 9641 1134.
sudakruco@westnet.com.au

Membroj de AEA kaj NZEA aŭtomate ricevas *ESK* on. Prezo de pliaj ekzempleroj de *ESK*: por membroj, po \$Aŭ3.00+poŝtendkosto; por nemembroj, \$4.25+poŝtendkosto. Mendo de la Libro-servo ĉe:

libroservo@ans.com.au

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €23,70. Pagu al la konto ael-w ĉe UEA, por la Libro-servo de Aŭstralio Esperanto Asocio.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas ©2005 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu gazeto estas ©2005 de la Aŭstralio kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata Ĉi tiu numero de *ESK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per iMac. La programo uzita estas Mellel. La tiparo uzita estas Warnock Pro.

SPECIALAJ KUNLABORANTOJ:

ODLO BOKSERP, I.N.K., K.R.A.J.O.N., K.R.E.T.

Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmisistoj

Nobla premiito en la fako Fuŝado

VERA DOLORO, L.M.K., D.H.A.M.N.

(Lia Multsuferanta Kontrolisto, Dumviva Honora Agoklagotago-Membro Nepra)

Wholly Printed in Australia

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302, Australia

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic 3168, Australia

If undeliverable return reply paid to
D. Broadribb
PO Box 643
York WA 6302
Australia

Esperanto sub la Suda Kruco
Vol. 13, No.1, Januaro-Februaro 2005

Print Post Approved
PP631048/00005

**SURFACE
MAIL**

**POSTAGE
PAID
AUSTRALIA**